

## Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2021

Jarkolekto 8 - Numero 3



*Karlsruhe 1994. Sferoidaj emblemoj. Tombako – 43 mm.*

*Wembley: 1924 – Ag – 36,5 mm – 30,7 g. Britio monfaranta. Reĝa Monfarejo Londono.*

# ENHAVOTABELO

de julio 2021

Titolpaĝo: Karlsruhe 1994. Sferoidaj emblemoj. Tombako – 43 mm. Wembley: 1924 – Ag – 36,5 mm – 30,7 g. Reĝa Monfarejo Londono.....	1
Enhavotabelo .....	2
De ni por ... ni! .....	3
Moneroj & medaloj .....	4
<i>Jubilea medalo de Belga Ligo Esperantista (1905-1955)</i>	
<i>12a Kongreso de K.E.F. Majorko 1925</i>	
<i>Maksim Gorkij (1868-1936)</i>	
<i>Bernard Golden (1925-2008)</i>	
Spikumajoj & suplementoj: La spesmilo-monunuoj en la praktiko .....	15
Aspektoj de numismatiko: Kontraŭstampoj kaj kontraŭsignoj .....	19
Medalistoj: 26. Anna Jarnuszkiewicz (°1935) .....	21
Por spuremuloj! .....	22
Historiaj aspektoj: Julio Mangada Rosenörn (1877-1946) .(1).....	23
Valormarkoj & valorbiletoj: Subtenada atesto Herzberg-am-Harz .....	25
Terminaro: alfabeto listo (26) .....	27
Numismatika forumo: Ĉu purigi aŭ poluri monerojn kaj medalojn? ....	29
El la gazetaro: .....	30
Retpoŝto .....	31
Anoncoj & eventoj .....	35

*Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)*

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts  
Provlegado: Jozefo Horvath  
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!  
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be  
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>  
[www.esperanto.es/biblioteko](http://www.esperanto.es/biblioteko)  
[www.kolektado.esperanto.cc](http://www.kolektado.esperanto.cc)

## *DE NI POR ... NI!*

Frostataj, grandparte ankoraŭ malhelpataj, estis kaj estas la interhomaj rilatoj, rigidigantaj la socian vivon dum pli ol unu jaro. Laŭdire dume la situacio pliboniĝis, almenaŭ por la ekonomie kaj finance riĉaj ŝtatoj, ne por la aliaj. Krome, ankaŭ ne por landoj en kiuj diktaturo, okupado aŭ superstiĉo anstataŭigas sciencon kaj komunan saĝon. Efektivitas nur internacia solidareco por komplete venki la pandemion, solidareco favore al tiuj kiuj tro ofte estas froste senhelpaj en la vasta mondo. Ankaŭ esperantistoj...

Inter mondcivitanoj staras ekranoj por krei impreson de veraj kontaktoj. Ankaŭ UEA bonintence decidis denove organizi virtualan Universalan Kongreson, la duan, espereble ankaŭ la lastan (*vidu en ĉi rubriko "Anoncoj kaj eventoj"*).

En Montrealo (Kanado) kreskas la "kulistimo" kaj la espero, post longa pandemia paŭzo, por povi organizi veran kontaktriĉan UK-n por la tutmonda esperantistaro, el kiu esperantistaj numismatoj antaŭĝojas pro speciala evento jam anoncita de ENA (*jk. 7 n-ro 1 p. 39*).

Bonega novaĵo por ENA estas tamen ke, malgraŭ la krizo, aliĝis la 23a asocia membro, nome "**Multana Esperanto-Rondo**" el Pakistano. Krome, kelkaj novaj individuaj membroj el Nederlando kaj Germanio. Tiel ni rapide proksimiĝos al la mejlŝtono de 150 individuaj membroj post malpli ol ok jaroj!

En ĉi tria numero de la oka jarkolekto okulfrapas unika medalo farita permane de la vidvino de nia altmerita, karmemora samideano Bernard Golden. En la koncerna tipo-grupo ĝi estas nur la dua ekzemplo post samspeca medalo el Pardubice (*jk.4 n-ro4 p.14-16*).

Koncerne la rubrikon "Historiaj Aspektoj" ni rekomendas la legadon de artikolo (daŭrigota) pri malaperinta kataluna artefakto kaj la famulo por kiu ĝi estis kreita.

Legu ankaŭ en la rubriko "Numismatika forumo", ĉu vere endas aŭ indas purigi la monerojn aŭ medalojn, kiuj ĉe vi kuŝas dormantaj en tirkesto aŭ monkelo.

Se vi sukcesis abunde ŝpari dum la pandemio, eble vi povus elspezi 1200 eŭrojn por hispana medaleto el 1925, priskribata sur paĝo 8. Ke prezoj en aŭkcioj malofte estas realismaj, tion ja sufiĉe bone scias spertaj numismatoj.

Laste sed ne balaste, la redakcio deziras al ĉiuj membroj kaj aliaj legantoj bonan legadon kaj agrablajn somerferiojn kaj senĉese pozitivajn novaĵojn pri la batalo kontraŭ la viruso. Do ĝis la fino de oktobro okaze de la aperigo de la lasta numero de la oka jarkolekto!

Bert



### *La solena Jubilea Kunsido*

*“Tiam, proksimume 75 nomoj estis vokataj de jubileantoj, inter kiuj 20 veteranoj, kiuj esperantistiĝis antaŭ pli ol 40 jaroj kaj laŭvidce ĉiuj cititoj venis sur la podiumon kaj S-ro Jaumotte pinglis sur ilian bruston la belan novan medalon de R.B.L.E.: arĝentan kun la litero V de “veterano” kaj “venko” por tiu speciala kategorio; bronzan por kiuj, kiuj restis fidelaj dum almenaŭ 25 kaj ĝis 39 jaroj.*

*Fine la prezidanto menciis ke, ĉar D-ro Kempeneers kaj li mem ricevis la oran medalon “pro merit”, ŝajnas dezirinde, ke ankaŭ aliaj meritplenaj membroj ricevu medalon “pro merito”.*

*Se li tamen povis kompulsi kaj kontroli listojn, en kiuj temis nur pri jaroj de membreco, li ne deziris, nek deziras, sola aŭ kun la nuraj estraranoj decidi pri la disdono de medaloj “pro merito”. Li do - ekkomencige - , elektis kvin nun ankoraŭĉiam laborantojn en la movado, pri kiuj neniu dubo povas ekzisti; kiujn cetere ĉiuj, ankaŭ la novuloj, konas kaj kiuj formos do la kontrolkomisionon, kiu esploros la proponojn, kiujn faros la administrantoj de la ligo. Al tiuj kvin personoj li transdonis la medalon “pro merito”. (...)*

*La prezidanto esprimis la deziron ke, se laŭ iu administranto de la ligo, iuj aliaj estas honorigotaj “pro merito”, ankoraŭ dum ĉi jubilea jaro, li skribu al li sian proponon kun detaloj, kiel ke la transdono de la medalo povu eventuale okazi dum la jubilea kongreso en Utrecht, post esploro kaj favora decido de tiu ĝi komisiono kaj de la administrantaro.”*

Fragmento el la ampleksa artikolo “LA FESTOJ de nia Ora Jubileo en Antverpeno” en la revuo “BELGA ESPERANTISTO”, jarkolekto 47a, N-ro 2a de februaro 1955a.

# MONEROJ & MEDALOJ

## Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

Jubilea medalo de Belga Ligo Esperantista (1905-1955)



Lando: Belgio

Metalo: aluminio / bronzo

Diametro: 25 mm

Jaro: 1955

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 3,41 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2 mm

## ***Averso:***

ĉirkaŭa ekstera ringo, sub pendigilo kun verda rubandeto:

- supre: ● BELGA LIGO ESPERANTISTA ●
- sube: ● UNUECO DONAS FORTECON ●

centra cirklo:

- supre: steleto en “suno” kun sunradioj
- sube: norda parto de la mondglobo kun indikoj de “EŬROPO”, “AZIO” kaj “AFRIKO”.
- Tute sube: ŝildeto kun “belga leono”.

flanke: supre kaj sube: du harmoniaj elstarajetoj kun ornamajetoj.

## ***Rimarko 1:***

dum priserĉado en la arkivo de la “Fondaĵo Vanbiervliet” en Kortrejko (Belgio) nia samideano Roland Rotsaert trovis ekzempleron de ĉi ordenaspekta medaleto, fiksita ene de menukarto okaze de la ORA JUBILEO DE REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA. Ĉu vere temas pri la medalo menciita en la artikolo sur la antaŭa paĝo, provizore ne estas certe. En la artikolo oni mencias orajn, arĝentajn kaj bronzajn variaĵojn, ne en aluminio. Ĉu eble la alumina estis kromfarita variaĵo por donaci al dum la festo forgesitaj merituloj, enmanigotaj dum la “Jubilea Kongreso” en Utrecht en 1956? (vidu tekston sur la antaŭa paĝo!)

## ***Rimarko 2:***

la surskribo “UNUECO DONAS FORTECON” estas esperantigo de devizo en la belga nacia ŝildo: “EENDRACHT MAAKT MACHT” (nederlandlingve), “L’UNION FAIT LA FORCE” (francelingve) kaj “EINIGKEIT MACHT STARK” (germanlingve).

## ***Rimarko 3:***

en la gazetara raporto oni legas pri la nova belga medalo de R. B. L. E. Tamen, sur nia alumina specimeno mankas la mencio “Reĝa”!

## ***Rimarko 4:***

sendube ekzistis minimume du tipoj, ĉar en la sama gazetara raporto ni legas, ke ekzistis speciala arĝenta medalo kun la litero V de *Veterano* kaj *Venko* por tiu speciala kategorio de membroj.

## ***Rimarko 5:***

prezidanto Jaumotte en sia prelego ankaŭ menciis ke “D-ro Kempeneers kaj li mem ricevis oran medalon *pro merito*”.



Medalinsigno por la Kongresanoj de la XIIª Kongreso de nia Federacio

### Kongreslibro kaj insigno

Al ĉiu kongresano oni donacos la kongreslibron kaj insignon, sed li nepre devas prezenti por ricevi ilin la ĝustatempe [petitan kongreskarton.

*Membrokartoj.* — Al la diversaj grupoj, kiuj pagis la kotizojn de la unua kvaronjaro, ni sendis la necesan nombron da kartoj disdonotaj al la grupanoj. Sur ĉiu karto oni skribu la nomon de la grupano. Rememoru ke laŭ la 9ª kondiĉo de nia regularo «Tots els esperantistes pertanyents a organismes federats, igual que els membres isolats, tindrán veu i vot en les assemblees anyals, i llur vot serà delegable a un altre federat mitjançant el *membrokartoj*, de presentació necessària per votar en nom propi i d'altres federats».

Grupoj, kiuj ne pagis ankoraŭ, sendu tuj la kotizojn por ricevi ĝustatempe la membrokartojn.

Membroj de K. E. F., pagu por ricevi la kvitancon de 1925.

BILANCO: De la 1 Julio 1924 ĝis la 1 Majo 1925.

ENSPEZOJ . . .	Saldo, la 1 Julio 1924 . . .	374'15 ptoj.	
	Donacoj . . . . .	530'40 »	
	Vendo de «K. E.», ŝlosiloj, vortaroj, k. a. . . . .	102'30 »	
	Kvitancoj (Kotizajoj kaj abonoj) . . . . .	1.626'40 »	2.633'25 ptoj.
ELSPEZOJ . . .	Diversaj elspezoj el la Vik' a Kongreso . . . . .	108'50 ptoj.	
	Preso de K. E. . . . .	1.650'10 »	
	Aliaj presajoj . . . . .	47'— »	
	Poŝtelspezoj . . . . .	158'75 »	
	Ĝeneralaj elspezoj . . . . .	74'05 »	2.038'40 ptoj.
SALDO: de la 1 Majo 1925. . . . .			594'85 »

El "Kataluna Esperantisto" tria epoko majo 1925 n-ro 11

## Tipo E1 – Ordenaspektaj medaloj

### 12a Kongreso de K.E.F. Majorko 1925



Lando: Balearaj Insuloj (Hispanio)

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: 12,5 g

Diametro: 33 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1925

Diko: 1 mm

#### ***Averso:***

unuflanka, insignecca medalo kun pendigileto

ĉirkaŭe: perlorando

ĉirkaŭa surskribo: •XII<sup>A</sup> KONGRESO DE K.E.F. •

•MALLORCA •MAJO 1925 •

meze: la urba blazono de Majorko

sube, oblikve: PALMA 21-24



### ***Rimarko 1:***

K.E.F. = Kataluna Esperanto-Federacio

ekde 1910, la fondo-jaro de K.E.F., landaj kongresoj okazis ĉiujare ĝis 1914. En la 1920-aj jaroj ili rekaptis sian ritmon, sed en 1928 dum la diktaturo de Primo de Rivero K.E.F. estis malfondita. Dum la Dua Hispana Respubliko (1931-1939) la reokazigo de la kongresoj estis denove permesita. Kaŭze de la hispana enlanda milito (1936-1939) kaj de la diktaturo de Franco, la kongresoj denove ĉesis de 1939 ĝis 1975.

Post la fondiĝo de Kataluna Esperanto-Asocio la kongresoj reokazis, sed nur ĝis 2008.

### ***Rimarko 2:***

la kolora blazono de Palma de Mallorca, kies esperantistaj membroj kunlaboris kun la Kataluna Esperanto-movado.



### ***Rimarko 3:***



la montrata medalo estis aĉetebla dum aktuala hispana aŭkcio de Todocolección kontraŭ **1200 eŭroj!** Ĉu do vere raraĵo?

### ***Rimarko 4:***

internaciaj Floraj Ludoj estis beletra konkurso. La nomo devenas de la okcitanaj kaj katalunaj Floraj Ludoj, mezepoka beletra konkurso, reprenita en la 19a-jarcento, okaze de la literatura renaskiĝo de tiuj lingvoj.



Iniciatis ilin Frederic Rejulà Vallès en 1908, kadre de la redakcio de “La Revuo”, lige kun la baldaŭa UK en Barcelono, kie la ĉeflaŭreato estis la germana poetino Marie Hankel.



Rusa ora medalo



Franca jubilea medalo



Multaj landoj, do ne nur Sovetunio kaj Rusio, honoris la verkiston.

## Tipo B 1 – Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Maksim Gorkij (1868 – 1936)



Lando: Sovetunio

Metalo: kupro - nikelo

Diametro: 31 mm

Jaro: 1988



Kvanto: 225 000

Pezo: 11,75 g

Medalisto: Albert Mirošniĉenko

Diko: 2 mm

### ***Averso:***

fone: mareca pejzaĵo kun fluganta mevo

antaŭplane: busto de Gorkij; kapo iom dekstren

ĉirkaŭa surskribo: “A.N.Gorkij 1868 – 1936” (cirile)

### ***Reverso:***

supre: nacia blazono de la iama Sovetunio

meze: SSSR (siglo de Sovetunio)

sube: RUBLJ (rublo) 1988

surskribo en la rando: “unu rublo” (cirile)

### ***Rimarko 1:***

“Maxim Gorkij” estis la pseŭdonimo de Aleksej Maksimoviĉ Peŝkov. Ĝi signifas “pleje amara.”

### ***Rimarko 2:***

SSSR: Unio de Socialistaj Sovetaj Respublikoj

### ***Rimarko 3:***

la tekstetoj sur la antaŭa paĝo atestas pri la subteno de Gorkij por la projekto de Zamenhof.

**Bernard GOLDEN** (naskiĝis la 23-an de novembro 1925 en Newark/ Nov-Jerzejo, Usono - forpasis la 19-an de oktobro 2008 en Veszprém, Hungario). Arkeologo kaj aŭtoro de ĉirkaŭ 3000 artikoloj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukoj en Esperanto.



Li lernis Esperanton en 1946, edziĝis al hungarino Éva De Chatel kaj ekloĝis en Hungario en 1971. Lia patrino estis esperantistino dum la fruaj jaroj de la 20a jarcento kaj persone konis doktoron Zamenhof en Varsovio. Liaj du filoj Dániel Lariko kaj Dávid Alko denaske parolas Esperanton.

Bernard Golden estis multjara korespondanto de la internacia magazino *Monato* kaj membro de la Akademio de Esperanto (fako: vortaro). Li zorgis pri la pli ol mil Esperantaj terminoj en *Dictionarium museologicum* (1986).

El liaj beletraĵ verkoj elstaras la rakontaroj «Hieraŭ - hodiaŭ - morgaŭ» (1982) kaj «Bestoj kaj homoj» (1987), la romanetoj «Infero en aŭtuno» (1993) kaj «Ŝamanoj en la kosmo» (1994) kaj la teatra volumo «Antaŭ la kulisoj» (1994).

Li ĉesis verki en Esperanto en 1998, sed atentigis pri tio, ke tamen li "ne intencas kabei".

Bibliografio de liaj 2898 publikigaĵoj estis enkomputiligita surbaze de lia propra listo en 2009 (*vidu en Vikipedio*).



Éva kaj Bernie (modelfoto por la medalo)

## Tipo F1 – Manfaritaj esperantaj medaloj

### Bernard Golden (1925-2008)



Lando: Hungario

Kvanto: 1

Metalo: kupro

Pezo: 62 g

Diametro: 100 mm

Artistino: Éva Golden

Jaro: 1971

Diko: 1 mm

#### ***Averso:***

unuflanka medalo kun trueto supre; la reverso montras la konturojn de la aversa bildo  
meze: busto de Bernard Golden maldekstren  
ambaŭflanke de la busto: vertikalaj skriboj en la hungara: *kiváló férj* (vidu rimarkon 1an)  
sube: 1971

#### ***Rimarko 1:***

en la sepdekaj jaroj de la antaŭa jarcento en Hungario estris komunista reĝimo. Tiutempe oni distingis laboristojn per la honora medalo de “eminenta laboristo” (*kiváló dolgozó*). Tamen, kiel humuraĵo (ironie) la medalistino surmetis la vortojn “eminenta edzo” (*kiváló férj*), do speco de dekoracio por sia edzo Bernie!

#### ***Rimarko 2:***

Éva estas la vidvino de la famega esperantisto Bernard Golden. Pri si mem ŝi deklaras, ke ŝi vizitis kemian mezlernejon, poste laboris en kemia esplorinstituto. Por fari la medalon ŝi unue

uzis martelon kaj “najlojn” kun speciala finaĵo (burinojn). La surfaco de la kupraj lamenoj estis traktata per la kemiaĵo CS<sub>2</sub>, kies rezulto estas nigra-kolora CuS-tavolo.

### ***Rimarko 3:***

la kupraĵoj, kiujn ni montras ĉi-sube, mezuras 150 x 160 mm. Ili estas memorobjektoj, kiuj surhavas bildigajn kuntitolojn, datojn, diraĵojn kaj proverbojn. La unuaj du estas teniloj por leteroj, la aliaj du por libroj.

### ***Rimarko 4:***

ĉi tipo de medalo estas la dua priskribata en la rubriko “Esperantaj manfaritaj medaloj”. Ĝi tamen meritis ankaŭ lokon en la rubrikoj “Ne-esperantaj medaloj rilate al Esperanto” kaj eĉ “Esperantaj murmedalonoj”!



ESPERANTO D-RO L.L.ZAMENHOF 1887



3a IREN ABALIGET 1970




SANON AMON MONON  
KAJ TEMPON POR ĜUI LIN



DU KAPOJ VALORAS  
PLI OL UNU

# SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

## La spesmilo-monunuo en la praktiko



Т а б л и ц а

Landoj Страни	Мона иуно Парацна единица	Э р н а р и.					
		Markoj	Frenkoj	Italajnaj unit.	Krojeraj	Frenkaj levo	Centimaj unit.
Germanujo	1 Marko de Germ. po 100 fenigoj	1	—	50	1.25	—	1
Austrijo-Hung.	1 guldeno po 100 krojeraj	2	—	1	2.50	—	2
Belgiujo, Svedujo, Kromantjo	1 franko 1 lejo—100 banaj po 100 sentimaj	—	80	40	1	—	—
Francio, Luksemb., Bulgariujo	1 levo—1 franko, po 100 sentimaj	—	80	40	1	—	—
Italujo	1 levo—1 franko, po 100 sentimaj	—	80	40	1	—	—
Daniujo, Svedujo	1 levo po 100 ostoj	1.15	—	57	1.44	—	1
Svedujo	1 'drakmo' po 100 lepoj	—	72	36	90	—	—
Granda Britanujo	1 Libro Sterlingo, po 20 ŝilin, po 12 pencej	20	—	10	25	—	1
Holandujo	1 guleno po 100 centoj	1.70	—	85	2.12 $\frac{1}{2}$	—	1
Norda Ameriko	1 dolaro po 100 centoj	4	—	2	5	—	4
Norvegio	1 Adero spesies po 4 kr, po 20 ŝilin	4.50	—	2.25	5.62 $\frac{1}{2}$	—	4
Portugaliujo	1 milreio po 1000 reisoj	4.60	—	2.30	5.83	—	4
Rusio	1 rublo po 100 kopoj	3.20	—	1.60	4.7	—	3
Hispanujo	1 peseta—1 levo po 100 centoj	—	80	40	1	—	—
	1 duro—1 dolaro, po 20 reuloj	4	—	2	5	—	4
Turkiujo	1 piastro po 40 para	—	38	19	22 $\frac{1}{2}$	—	—

En 1900 evidente la spesmila monunuo jam ne ekzistis!



**INTERNACIA MONSISTEMO**  
Elpensita de R. DE SAUSSURE en 1908. Oficiale uzata de U. E. A.

1 \$ aŭ Sm. (spesmilo) = 100 Sd. (spesdekoj) = 1000 S. (spesoj).  
10 \$ egalvaloras ormoneron da 8 gramoj, laŭ proporcio 11/12.

Lando	Valoro de la naciaj monoj laŭ la Spesmilo (s\$).	Valoro de la Spesmilo laŭ la naciaj monunuoj.
Argentino . . . . .	1 peso = 100 centavos = 2,019	1 Spesmilo = 0,505 pesos.
Aŭstrio-Hungarujo. . . . .	1 krono = 100 heller = 0,416	— = 2,40 kronen.
Bolivio . . . . .	1 boliviano = 100 centavos = 0,851	— = 1,174 boliviano
Brazilujo . . . . .	1 milreis = 1000 reis = 1,121	— = 0,892 milreis.
Ĉilio . . . . .	1 peso = 100 centavos = 1,436	— = 0,676 pesos.
Egiptujo . . . . .	1 eg. shilling = 5 piastroj 7. = 0,510	— = 1,955 eg. shilling.
Francujo . . . . .	1 franc = 100 centimes = 0,396	— = 2,525 francs.
Germanujo . . . . .	1 mark = 100 pfennig = 0,487	— = 2,046 mark.
Granda Britujo . . . . .	1 shilling = 12 pence = 0,498	— = 2,063 shilling.
Hindujo . . . . .	1 rupee = 16 annas = 0,970	— = 1,031 rupee.
Hispanujo . . . . .	1 peseta = 100 centimos = 0,362	— = 2,762 pesetas.
Japanujo . . . . .	1 yen = 100 sen = 1,010	— = 0,978 yen.
Meksikujo . . . . .	1 peso = 100 centavos = 1,029	— = 0,495 pesos.
Nederlando . . . . .	1 gulden = 100 cents = 0,827	— = 1,21 gulden.
Portugalujo . . . . .	1 milreis = 1000 reis = 2,019	— = 0,451 milreis.
Rusujo . . . . .	1 rubl = 100 kopejki = 1,056	— = 0,947 rubl.
Svedujo . . . . .	1 kron = 1 0 öre = 0,545	— = 1,82 kron.
Turkujo . . . . .	10 piastres = 400 para = 0,924	— = 10,983 piastres.
Usono . . . . .	1 dollar = 100 cents = 2,052	— = 0,482 dollars.
Venezuelo . . . . .	1 bolivar = 100 centavos = 0,396	— = 2,525 bolivar.

Belgujo, Bolgarujo (100 stotinki), Grekujo (100 lepta), Italujo, Rumunujo (100 bani), Serbujo (100 para), Svisujo same kiel Francujo; Danujo, Norvegujo same kiel Svedujo; Aŭstralio same kiel Granda Britujo; Kanado same kiel Usono.

La Centra Kuro de U. E. A. akceptas la Spesmilon je la valoro de fr. 2,50 mustataŭ : 2,53) sed ne per malpli. 2 germanaj markoj aŭ 2 aŭstrijaj kronoj ekz. ne valoras unu spesmilon.





### KOMPARA TABELO DE LA CĈFAJ MONUNUOJ

Nomo de la lando	Valoro en	Austria krono	Brita Funto	Franca Franko	Germana Marko	Nederlanda Guldeno	Portugala Milerjsjo	Rusa Rublo	Sveda Krono	Usona Dolaro
Aŭstrio-Ungario	1 krono = 100 heleroj	—	£ 24	Kr. 0,95	Kr. 1,17	Kr. 2	Kr. 5,33	Kr. 2,53	Kr. 1,53	Kr. 1,93
Britujo . . .	1 Funto = 20 ŝilingoj = 12 penecoj	10 1/2 p.	—	\$. 9 1/2	\$. 1	1 \$. 8 p.	4\$. 5 p. 1/2	2\$. 1 p.	1\$. 1 p. 1/2	4\$. 2 p.
Franco . . .	1 Franko = 100 centimoj	Fr. 1,05	Fr. 25, 22	—	Fr. 1,23	Fr. 2,08	Fr. 5,60	Fr. 2,06	Fr. 1,39	Fr. 5,18
Germanujo . . .	1 Marko = 100 penicoj	M. 0,85	M. 20, 50	M. 0,81	—	M. 1,69	M. 4,55	M. 2,14	M. 1,13	M. 4,21
Nederlando . . .	1 Guldeno = 100 centoj	G. 0,50	G. 12, 12	G. 0,48	G. 0,59	—	G. 2,68	G. 1,28	G. 0,66	G. 2,50
Portugalujo . . .	1 Milrejo = 1.000 rejos	M. 0,187	M. 4,500	M. 0,178	M. 0,220	M. 0,371	—	M. 0,47	M. 0,247	M. 0,925
Rusujo . . .	1 Rublo = 100 kopakoj	R. 0,394	R. 9,48	R. 0,37	R. 0,46	R. 0,78	R. 2,10	—	R. 0,52	R. 1,94
Svedujo . . .	1 Krono = 100 oreoj	Kr. 0,75	Kr. 18, 14	Kr. 0,72	Kr. 0,88	Kr. 1,50	Kr. 4,03	Kr. 1,91	—	Kr. 3,72
Usono . . .	1 Dolaro = 100 centoj	D. 0,20	D. 4,86	D. 0,19	D. 0,23	D. 0,40	D. 1,08	D. 0,51	D. 0,26	—

**RIMARKO.** — Kiam oni volas kompari la valoron de monero de unu lando kun tiu de alia, oni serĉu la lokon, kie la vertikala linio kruciĝas la horizontalan. Ekz. : Se oni deziras sci la valoron de germana « marko » laŭ angla monsisistemo, oni serĉu tiu lokon, kie la germana marko de la vertikala linio IV renkontas la horizontalan linion Britujo (2). La moneroj estas submetitaj al kurzdiferencoj.

Belgujo, Bulgarujo (100 stotinki), Grekujo (100 lepta), Italujo, Rumanujo (100 bani), Serbujo (100 para), Svisujo same kiel Francujo; Danujo, Norvegujo same kiel Svedujo; Aŭstralio same kiel Granda Britujo; Kanado same kiel Usono.

*Tabelo el la militjaro 1914, la jaro de la neokazinta UK en Parizo: la spesmilo malaperis ...!*

## Mono.

En la aldonita kompara tabelo oni trovas la proksimuman valoron de la diversaj monunuoj uzataj en la ĉefaj landoj

Por siaj internaj monaj interrilatoj, la Esperantista publiko kutime uzas la spesmilan sistemon, elpensitan de D<sup>ro</sup> de Saussure. La bazo de tiu sistemo estas difinita pezo da oro esprimita per integra nombro de gramoj : 10 Sm. egalvaloras ormoneron da 8 gramoj laŭ proporcio 11/12. 1 Spesmilo (Sm.) = 100 Spescentoj (Sc.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 1000 Spesoj (S.).

Ĉar la sistemo estas en sia nomigado tute simila al la vico : kilometro, hektometro, dekametro, metro, estas konsilinde montri la dek- kaj centonojn de Sm. per ciferoj dekstre de la Sm., kaj apartigitaj per komo. Ekz. : 3,45 Sm. (3 Sm. kaj 45 Sd.). La maniero ĉiam uzi tri ciferojn, ekz. 3,450 Sm. estas komplika kaj erariga.

Malgraŭ la ora bazo, la sole ebla scienco, la Sm. nek forigas la kurzdiferencojn inter la diversaj landoj nek havas konstantan valoron kompare kun iu nacia monero. Tamen ĝi utilas por sufiĉe precize esprimi malaltajn sumojn kaj ĝenerale kiel proksimuma komparilo de valoroj, laŭ la rilato : 1 Sm. = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = 1 rublo = 2,40 aŭstriaĵ kronoj = 1,80 skandinavaĵ kronoj = 1,20 nederlanda guldeno = 1/2 dolaro, k. t. p. - U. E. A. kalkulas oficiale la Sm. laŭ la firma proporcio : 1 Sm. = 2,50 svisaj frankoj.

En internaciaj prezaroj, k. t. p., oni notu la prezojn en naciaj moneroj kaj aldonu la Sm. kiel helpilon por rapida *proksimuma* taksado. (Pro la deviga neprecizeco de la Sm., komplikaj ciferoj kiel ekz. 0,256 Sm. ne utilas). Por ke la ricevonto nek ricevu tro malmulte, nek la sendanto elspezu tro multe, oni ĉiam skribu sur la poŝtmandatoj kaj ĉekoj la sumojn en la nacia valoro de la ricevonto, ekz. por Germanujo en Mark. La kurzon inter la eksterlanda kaj enlanda mono kalkulas la poŝto aŭ banko.

# ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

## Kontraŭstampoj kaj kontraŭsignoj

### Esperanta propagandcela kontraŭsigno



*La oficiala hispana monero en bronzo supre (Cu 950/1000; Sn 40/1000; Zn 10/1000) pezas dek gramojn (CIEN PIEZAS EN KILOG. = cent moneroj en unu kilogramo).*

*Tiu monero datas el la epoko de 1868 ĝis 1871, la t.n. “Provizora Registaro” (Gobierno Provisional), post la tiama revolucio, do inter la perforta faligo de reĝino Izabelo 2a en 1868 kaj la investado de la nova reĝo Amadeo 1a de Hispanio. Tiu intermezo estas en Hispanio nomata ankaŭ “Sexenio Revolucionario” aŭ “Sexenio Democrático”.*

*La surskribo “ESPERANTO SI”, do evidente devas esti aldono de post 1887. Ĉi tipo de oficiala monero cirkulis ĝis la 29a de novembro 1941.*

*Tiaj moneroj kun aldonaj en- aŭ surskriboj estas vere ne raraj, sed kun la esperanta aldono ĝis nun estas al ni **konata nur unu ekzemplero**. Krome, la aliaj ekzemploj montras fake aŭ amatore permane faritajn gravuraĵojn.*



Tamen, la procedo kies rezulto videblas en la esperanta specimeno (do kun regulaj kaj klare gravuritaj literoj) provizore ŝajnas tute ne klarigebla. Eĉ ne fama fakulo kiel Paul Huybrechts, belga majstro-artisto, profesia kaj sperta medalisto, ne kapablas senvualigi la “trukon” uzitan de lia nekonata kolego.

Ĉu la rezulto estis akirita per uzo de elektrolizo? Aŭ eble per fando averse-reverse kun uzo de silikono, li demandas sin... Krome, se la teksto estus gravurita en la matricon, la figuro de la leono estus montranta spegulan bildon. Sed, tion oni ne rimarkas! Huybrechts tamen konstataj diras, ke la artisto certe ne estis amatoro, ĉar li sendube uzis tre komplikan teknikon. Cetere la damaĝoj sur la iama monero (pro eluziĝo aŭ preparcela glatigado) malhelpas malkovri la sekreton de la proceso.

Nu, pro la malfacila tekniko, *estas ne maleble, ke nia ĵetono estus unika ekzemplero!*

En la hispana tiajn numismatikaĵojn oni nomas “resellos políticos”. Ili estas iaj protestiloj aŭ reklamiloj de adeptoj aŭ kontraŭuloj, kiel montras jenaj du supraj ekzemploj pri la sama politikisto:



Temas pri malnovaj moneroj, unu kun mencio “por” (= SI), la alia kun mencio “kontraŭ” (= NO) la iama hispana prezidento Antonio **Maura**, kiu regis de 1907 ĝis 1909.

Tre probable la esperanta specimeno ne havis politikan signifon, sed ĝi estis inspirata de la kutimaj politikaj ekzempleroj, do propagandilo, farita aŭ komisiita de iu esperantisto. Estus do agrable trovi aliajn tiajn ekzemplerojn, kaj – kial ne? – ekzempleron kun la mesaĝo: “ESPERANTO NO”!

## MEDALISTOJ

### 26 Anna Jarnuszkiewicz (°1935)



La fraŭlina nomo de Anna estas Lisowska. Ŝi naskiĝis en Varsovio (Pollando). En 1958 la artistino finstudis en la Ŝtata Altlernejo de l' Belaj Artoj en Vroclavo.

Anna okupiĝas pri pentrado, desegnado, skulptado, dekoracia konstruado kaj medalarto. Ŝi estas fakula medalistino pri portretmedaloj, i.a. de Jan Kochanovski, Joachim Lelewel, Adam Mickiewicz, Marie kaj Pierre Curie, Józef Czechowicz kaj Ludoviko Lazaro Zamenhof (1979).

Ŝi kreis (avere kaj/aŭ reverse) 38 polajn monerojn en la epoko 1952-1989. Krome preskaŭ 110 preĝitajn aŭ fanditajn medalojn.

Ŝiaj moneroj estas kutime subskribitaj per la monogramoj A kaj J.


La suba monero, jam priskribita en *jk. 3 n-ro 4 p. 5*, estis skizita de Anna Jarnuszkiewicz (portretflanko) kaj la alia flanko de Stanisława Watrobska – Frindt.



## POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. **Bonvolu helpi nin!**

### 22a enigmo



Lando: Britio(?)

Kvanto: serĉata

Metalo: orita (?)

Pezo: 13,8 g

Mezuroj: 38,1mm x 38,1mm

Medalisto: serĉata

Jaro: 1912

Diko: 1,75 mm

“II. ESPERANTO-TENNIS-TURNIER 29. Sept. 1912 1 KLASSE”

“MIXED DOUBLE (gajninto / gajnintino = I.PREIS)”

***Kiu el vi havas aŭ povas serĉi informojn pri la montrata premio-medalo? Ĉu eble pri la 1a aŭ pri postaj turniroj?***


***Antaŭdankon!***

***La redakcio***

# *HISTORIAJ ASPEKTOJ*

## **Julio Mangada Rosenörn (1877-1946)**

### A. Malaperinta artefakto esperantista el 1936



*Diversaj esperantistoj – eĉ famaj pioniroj – plendis pro la senĉesa malperdo de diversspecaj esperantaj arkivaĵoj, kiuj estas ege gravaj kaj necesaj por povi efike kaj plejeble komplete priskribi la historion de nia movado. Unu el la plej gravaj kaj malkompletaj specoj estas la leteroj de kaj al Zamenhof. Nur fojefoje kaj neatendite io fine reaperas en aŭkcio...!*

*Krome, en la kampo de numismatiko kun bedaŭro ni devas tro ofte konstati, ke numismatikaj artefaktoj esperantaj hazarde aŭ intence estis perditaj. Artikolo en nia antaŭa numero ekzemple montras kiel probable malaperis la nura ora spesmila pagmedalo kaj samtempe omaĝa medalo, enmanigita al Zamenhof okaze de la 25-jara jubileo de Esperanto en 1912. Cetere tiu fenomeno koncernas la tutan historiografion pro nekorekteblaj detruado kaj rabado kaŭze de militoj kaj naturkatastrofoj, kiuj foje nur postlasas kelkajn “panerojn” por la sciencistoj.*

Temo de ĉi artikolo estas ŝildo (plato, plaketo) kreita en 1936 en Hispanio. Nur dank’al la fervora kolektemo de Raymond Borlé, iniciatinto de ampleksa kolekto pri ZEO-j (Zamenhofaj Esperanto-Objektoj), ni havas almenaŭ unu foton, senditan antaŭ kelkaj jaroj de nia kataluna samideano Santiago Torné al s-ro José Antonio del Barrio Unquera, kiu skanis ĝin.

Tamen neniu konas la detalojn (mezurojn, substancon/metalon, pezon, nomon de la artisto ktp) de la plato nek la cirkonstancojn kiujn ĝi travivis. Laŭdire en 1936, komence de la hispana intercivila milito, la madridaj esperantistoj alvokis al monkoklekto por ellaborado de plato honore al Mangada kaj ties elmeto en publika loko. Ni tamen ne vere scias, al kio ĝi vere estis destinita. En tiu jaro 1936 la famo de Julio atingis kulminon. Li ricevis amason da agnoskoj pro sia agado kiel estro de militista taĉmento. Li eĉ ricevis i.a. la “oran medalon” de la urbestro de Madrido.

Kiam kaj kiel ĝi malaperis, ni provizore ne scias. Mi citas el letero de nia samideano s-ro Del Barrio al nia redakcio: *“Se ĝi restis ie en Madrido, ni supozas ke la venkintoj de la milito detruis ĝin. Se ĝi troviĝis ĉe Mangada, li ne portis ĝin al la ekzilo; tion ni scias, ĉar antaŭ kelkaj jaroj revenis liaj posedaĵoj, kiuj nun troviĝas en oficiala arkivo; mi havis la okazon ekzameni ilin, kaj tie ne troviĝas la plato.”*

Do, ni povas priskribi ĝin nur surbaze de la supra foto, kiun skanis kaj havigis al ni s-ro Del Barrio.



Julio Mangada Rosenörn

Okulfrapas du portretoj, unu iom pli granda maldekstre, montranta zamenhofan buston, la alia, malpli granda, pri Julio mem. Evidente ne mankas esperanta stelo. Diversaj “klasikaj” ornamaĵoj dekoras kaj ornamas la bildon. Ege interesa estas la surskribo en la mezo: *“Al Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio generalo D. Julio Mangada Rosenörn. Tre kompetenta kaj nelacigebla batalanto de la Esperanto-movado en Hispanujo. Rekoninte liajn meritojn dediĉas tiun ĉi dankecan pruvon la madridaj samideanoj. Madrid. Oktobro de 1936.”*

Sinjoro Del Barrio skribis komenton pri la titolo “generalo” (la mongramo D signifas Don, hispana respektoformo antaŭ persona nomo): *“En la plato kaj ankaŭ en la priskribo de la afiŝo aperas la titolo "generalo"; pri tio indas komenti, ke li neniam vere atingis tiun rangon. Kiam la milito komenciĝis, li estis vickolonelo, kaj post liaj venkoj la popolo kaj speciale liaj trupoj petis, ke li estu nomumita generalo, kaj oni faris improvizitan ceremonion, por surmeti al li la koncernan rubandon. La registaro tamen nur plirangigis lin al la sekva rango, do kolonelo, kaj tiel li finis la militon. Sed la esprimo "popola generalo" disvastiĝis kaj restis en multaj lokoj.”*



Afiŝo pri la herooj de la Popola Fronto dum la Hispana Civila Milito

“Reklamilo eldonita dum la hispania Interna Milito, reprezentanta la fortojn de la Popola Fronto; notu la mikson de personoj, sigloj kaj simboloj. La homo staranta maldekstre, en blua kostumo, estas la elstara esperantisto Julio Mangada, la “popola generalo.”

Daŭrigota



## VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Atesto pri subtenado de la konstruo de “Zamenhof-monumento” en Herzberg (2)



Lando: Germanio

Kvanto: *serĉata*

Substanco: papero

Jaro: 1989

Mezuroj: 210 mm x 147 mm

Desegnisto: *serĉata*

### ***Priskribo:***

la koncepto “briketo” en Esperanto estas enhejmiĝinta kiel metaforo por la financa subtenado de (nova) projekto far kaj por la esperantistaro, plivastige por la mondcivitanaro.

Sur la atesto kompletigendaj personaj datumoj, kiuj montru, ke la posedanto elspezis minimume 50 eŭrojn por subteni la konstruon de Zamenhof-monumento en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo; iu uzis la vorton “subvencikvitanco”.

Kion subtencele aĉetis la subteninto, estas t.n. briko aŭ “konstruŝtono”, unu el pluraj bezonotaj.

Meze sur la marko troviĝas, en ovalo, foto de la konstruita monumento, flankigita de du cirkloj kun stiligita laŭrokrono, kiu emfazas la solenecon de la evento, t.e. la 150an naskiĝtagon de “la kreinto de Esperanto” (15.12.2009).

## *Festi la jubileon de d-ro Esperanto en la Esperanto-urbo*

En decembro en ĉiu angulo de la mondo okazas Esperanto-eventoj okaze de la naskiĝtago de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ĉi-jare ni festos la 150-an datrevenon de lia naskiĝo. En Herzberg la festo havos esceptan aspekton, kaj tial mi precipe invitas al ĉi tiu loko, la sola loko en la mondo, kiu uzas la oficialan kromnomon "Esperanto-urbo" ekde julio 2006.

Loĝante en Herzberg kaj laborante kiel volontulino en Interkultura Centro Herzberg (ICH), mi povas konatiĝi kun funkciado de tiu fama loko en Esperantujo. Ĉi tie mi preskaŭ ĉiutage travivas gravajn eventojn, observante la penan laboron de la kernaj aktivuloj de ICH Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, promociantaj la lingvon Esperanto kaj organizantaj multajn Esperanto-aranĝojn. Ĉi-jare, kunlaborante kun multaj esperantistoj, ili dediĉis multe da tempo por prepari la eksterordinaran eventon en la Zamenhof-jaro.

La 15an de decembro 2009 en la Esperanto-urbo Herzberg okazos speciala inaŭgura ceremonio — en la centro de la urbo staros marmora Zamenhof-monumento. Ĝi estos la unua en Germanio. Al tiu speciala evento, al la inaŭgura ceremonio estas invitataj multaj gravaj personoj, reprezentantoj de organizaĵoj, partioj, asocioj. Ni garantias neforgeseblan etoson, riĉan programon kun akcepto en la kavalira salono de la bela kastelmuzeo. Ne mankos muziko, kantado de la gimnazia koruso, kaj estos bufeda akceptado. Valoras alveni pli frue, ĉar jam ekde la 11a ĝis la 15a de decembro estos organizata Speciala Studsesio pri Zamenhof, kie ni trarigardos lian vivon, multflankan agadon kiel verkisto, poeto, tradukisto.

Vi povas komune kunkonstrui la Esperanto-urbon Herzberg, ege gravan lokon por la tuta Esperanto-movado, aĉetante specialan "Zamenhof-briketon" je valoro de 50 eŭroj kun individua numero, stampo kaj subskriboj. Tio helpas financi tiun gravan projekton kaj vi esprimas per ĝi ankaŭ solidarecon kun la urbo, kun la planoj por disvastigi Esperanton.

Venu al Herzberg la Esperanto-urbo, kiu situas meze de Germanio, ĉe la suda flanko de la Harz-montaro kaj estas vizitinda ne nur pro bela pejzaĝo kaj vera ripozo sed ĉi-jare decembre specife pro la Zamenhof-monumento kaj la jubilea festo.

**Małgosia Komarnicka**

# TERMINARO

## Alfabeto Listo (26)

**ekspertizo:** *spertula analizo de kolekto.*

**galvanizi:** *metodo por meti tavoloeton de metalo sur objekton per uzado de elektra tekniko.*

**giskavo:** *kavaĵo en monero aŭ medalo kaŭze de eraro en la gisproceso*

**gismedalo:** *fandita medalo.*

**ĝustigaĵo:** *monerplateto adaptita al la oficiala pezo. Spurojn de ĝustigo montras skrapaĵoj sur la monero.*

**hibrida monero:** *nomo de monero, ĉe kiu nevole estis uzita la sama stampo por la du flankoj aŭ du diversaj stampoj, kiuj ne interkonvenas aŭ kongruas.*

**jarkompleto:** *aro de moneroj eldonitaj en la sama jaro en la sama lando.*

**kurtaĝo:** *la diferenco inter la vera valoro de oro kaj la pagenda sumo.*

**kvaronturniĝo:** *prenu moneron inter montrofingro kaj dikfingro kun la averŝa flanko antaŭ vi, sekve turnu ĝin komplete, tiel ke la reverso estas antaŭ vi. Se la pozicio dekliniĝas kvarone dekstren aŭ maldekstren, vi konstatas kvaronturniĝon.*

**lasoprezio:** *la malpli alta prezo de ora monero, menciata en la gazetaro aŭ la vendoprezio.*

**listelo:** *pli altigita rando ĉirkaŭ monero/medalo.*

**lotajaĵo:** *diversaj moneroj aŭ medaloj kunigitaj sub la sama numero por aŭkcio.*

**lotnumero:** *numero aljuĝita de aŭkciisto al unuopa monero/medalo aŭ al lotajaĵo.*

**medalstampo:** *ambaŭ flankoj havas la saman pozicion (0 aŭ 360°). Simbolo: ↑.*

**misstampo:** *akcidence mise stampita monero.*

**monerkompleto:** *serio de diversaj moneroj kunigitaj de iu oficiala monfarejo.*

**monerdekliniĝo:** *de la stampopozicio dependas la interkonvena pozicio de ambaŭ flankoj. Se okazas eraro, la rezulto estas kurbiĝaĵo. Kurbiĝo de 180° decidas pri la terminoj “monerstampo” aŭ “medalstampo”.*

**monerstampo:** *la reverso estas renversita rilate la averson (180°). Simbolo: ↓.*

**prezopropono:** *la plej alta proponata sumo por objekto en aŭkcio.*

**procentaĵo:** *vidu “kurtaĝo”.*

**stampmedalo:** *stampita medalo.*



## Ĉu purigi aŭ poluri monerojn kaj medalojn?

*Sur la antaŭa paĝo vi vidas du specimenojn de la ikona, tre rara kaj multekosta arĝenta "monero" (90% Ag / 10% Cu) de unu spesmilo, krome unu de la du-spesmila. La du supraj montras diversajn patinojn depende de la iama loko de konversado, de la kvalito de la aero, de la lumo, de fingrumado ktp. La arĝento kaj la kupro –depende de la ejoj– reagis kaj determinis la nunan aspekton. Tio estas senĉesa proceso, tre ŝatata de ĝisostaj numismatoj.*

*La specimeno tute sube aspektas kiel spegulo aŭ nomŝildo de advokato. Terura rezulto de purigado, frotado aŭ polurado. Tamen tiu montrata objekto en aktuala aŭkcio kostis pli ol 100 eŭrojn, sufiĉe normala kaj certe ne tro alta prezo por normala, origina specimeno kun normala patino, ĉar la originalaj spesmilo-moneroj tute ne estis poluritaj, nek per maŝino nek permane! La komerca valoro de la suba estas ekde la terura "plibeligo" nur la valoro de kelkaj gramoj da arĝento.*

Krom tiu de oraĵoj, la aspekto de objektoj faritaj surbaze de noblaj metaloj videble ŝanĝiĝas. Jam delonge servistoj aŭ posedantoj mem senpatinigis diversajn arĝentajn objektojn en la domoj de riĉuloj, ĉar ili estis vere uzataj kaj devis brili kiam venis gastoj. Aliaj ekzemploj estas la kupraj profesiaj nomplatoj de advokatoj, notarioj, kuracistoj k.a. Malbrilaj nomplatoj sur la fasado ja ne povas allogi eventualajn klientojn!

Kio ĝustas por anoj de memstaraj profesioj, tio ne validas por arkeologoj kaj aliaj sciencistoj, kiel numismatoj. Evidente, malnovaj objektoj en malbona stato pro malpuriĝado en lokoj kie ili estis elfositaj, estas purigindaj, sed tre tre singarde, ekzemple per delikataj brosetoj aŭ sub mikroskopo per same singarde uzataj (dentistaj) instrumentoj.

Kion ni ĝis nun pritraktis en ĉi artikolo, apartenas al la necesa priskribocela purigado, t.e. igi ion malpuran denove pura, por povi malkovri kiel aspektis la objekto iam. Ne pli, ne malpli. Tio koncernas antikvajn artefaktojn ĝenerale, certe ankaŭ (malnovajn) monerojn kaj medalojn. Do, ne ekzistas kontraŭargumento rilate al purigado de malpura monero aŭ medalo laŭ la ĝusta metodo. Lavado de sordida monero per akvo, senacida sapo kaj broseto, diligente kaj singarde, ne kompareblas al polurado de kupra nomplato aŭ arĝenta manĝilaro!

Mortinda peko kaj senlima stultaĵo estas purigado per kemia frotpurigilo kaj sekve polurado de la objekto, ĝis ĝi aspektas kiel spegulo. Tiel kaj tial la valoro de la objekto estas nur la valoro de la titro de eventuala nobla metalo. Perdiĝas grandparte la historia valoro, malpliĝas la valoro numismatika, ĉefe kundifinita de la (ofte belega) patino, do ankaŭ la komerca valoro perdiĝas!

Bert

## Medalo de Komenio por Esperanto

*Post Ludvík Chytil nun ankaŭ Miloslav Švábek ricevis Medalon de Komenio de la urbo Přerov pro sia laboro por Esperanto. Li mem pri-skribis la okazaĵon jene:*



La solenaĵo en la antaŭvespero de la 27-a de oktobro estis verdire impona. Ke mi estis inter kvin honorigitaj personoj (elektitaj el 25 proponoj) estis precipe merito de gvidantoj de E-Klubo en Přerov, kiuj faris la proponon.



Jes, vi pravas, ĝi estis modela propagando de Esperanto kaj ĝia ideo, pri kiuj tiamaniere estis informitaj ne nur tiuj, kiuj partoprenis la solenan ceremonion, sed ankaŭ ĉiuj partoprenintoj de la vespera koncerto, al kiuj ni estis prezentitaj. En la dua parto de la koncerto ludis fortepianon artisto Jiří Pazour. Ni, honorigitaj personoj, povis proponi temon, je kiu li kreis improvizan muzikon. Mi elektis temon "Amikeco inter nacioj". Tiutema lia improviz-ludo estis tre bela kaj sukcesa (ne nur laŭ mia opinio).

## 2-a Postferia renkontiĝo en Strakonice

okazinta 13.9.2008, kunvenigis preskaŭ tridekon da esperantistoj, ne nur el Suda Bohemio. La aranĝo estis organizita de E-klubo Písek, precipe de ties vic-prezidantino Věra Muchnová el Strakonice.

En la biblioteka prelegosalono en la burgo Strakonice (en kies muzeo ekde pasinta jaro haveblas kompleta ĉiĉerona teksto en Esperanto) okazis interesa, per projekciado akompanata prelego de inĝ. Pavel Pavel, kiu mondfamiĝis kiel iriginto de misteraj statuoj *moai* sur Paskinsulo. Por tiu ĉi okazo EK Písek pretigis por esperanta Vikipedio plurajn artikolojn (pri Pavel Pavel, inkluzive tradukojn al la franca, hispana kaj japana lingvoj, faritajn de esperantistoj, pri interesajoj en Paskinsulo, pri Strakonice ktp), kiuj estis presforme donacitaj al la preleginto. Por la partoprenantoj kaj por bezono de la biblioteko estis pretigita kaj disdonita ankaŭ ĉeĥlingva informilo pri nuntempaj utiligeblecoj de Esperanto.

Antaŭ la tagmanĝo la partoprenantoj vizitis ekspozicion pri sakflutistaj festivaloj en la burga kapitula salonego. La posttagmeza tempo estis dediĉita al aktualaĵoj el Esperantujo, precipe el UK en Roterdamo. Kiel interesaĵo estis projekciitaj kelkaj E-filmetoj, i.a. antaŭfilmo al „Kroniko de Narnio“ subtitolita en Esperanto de 14-jara Edita Dvořáková el Písek. M. Turková prezentis novan poemplibron de Čestmír Vidman, paralele tradukitan de J. Krolupper al Esperanto.

# **RETPOŜTO**

de vi por ni!

## **Reagoj kaj konversacioj**

09.04.2021 11:28

*Saluton Jozefo!*

*Jen denove provlegenda numero de "Esperanta Numismatiko", iom pli frue ol kutime, ĉar kaŭze de la pandemio al mi ne mankas liber(labor)tempo, espereble ankaŭ ne al vi.*

*Eble vi jam estis vakcinita kaj infektorezista. Ni devas atendi ĝis la 19a de aprilo.*

*Lasu min jam nun denove danki vin pro via senĉesa kaj profesia kunlaboro favore al ENA. Espereble mi iam kaj iel povus rekompenci vian provlegadon (Ĉu vi eble partoprenos en la UK en Montrealo 2022?).*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

12.04.2021 19:44

Kara Bert,

antaŭ ĉio mi ĝojas, ke la kronvirusa epidemio evitis vin, kaj vi estas sana kaj vigla kaj ĉefe aktiva por nia ĝojo kaj utilo de la Esperanta numismatiko. Min kaj mian familion same ne trafis la malsanaĉo, kaj ni jam ricevis unu vakcinon, morgaŭ ni ricevos la duan.

Al Montrealo mi neniel povos veturi pro familiaj kaŭzoj (miaj edzino kaj bopatrino daŭre malsanas, bezonas flegadon).

Misoj en tekstoj ĉiam troviĝas, homa laboro malofte estas sen eraroj. Gravas, ke foje korektitaj ne reaperu!

Permesu al mi tri rimarkojn al la terminologia parto:

kapoverso: iel ĝi ne kongruas kun Eo. Se ĝi estas kunmetita vorto (kapo + verso), ĝi ne havas sencon, se ĝi estas analogo al *averso*, *reverso*, ĝi same ne ĝustas. Ĝi estus pravigebla laŭ la 15a regulo, se ekzistus fremdvorto *capoverso* kun la pretendata senco (en la itala *capoverso* signifas alineon). Do ĉu kapoflanko?

legendo: havas alian, jam firmiĝintan signifon en Eo. Ĉu rondskribo?, ĉirkaŭskribo?

titanitro: mi ne konas tian kombinaĵon. Ĉu titan-nitrido?

randskribo: kolizio de kvin konsonantoj! Ĝi estas (almenaŭ por hungaroj) simple neelparolebla. Krome *s* senvoĉigas la antaŭan *t*, kaj la vorto elparoliĝas kiel rantskribo. Prefere: randoskribo.

Kun amikaj salutoj: Jozefo



22.04.2021 11:27

*Karaj membroj kaj aliaj legantoj!*

*Dum pandemio oni ne dikiĝas nur frandante kion surtabligas la ENA-revuo.*

*BONAN APETITON!*

*Kore,*

*Bert*

22.04.2021 12:02

Kara Bert!

Dankon, mi jam legis parton kun granda apetito.

Walter

22.04.2021 12:59

*Kara Walter!*

*Jen fidela leganto! Mi deziras al vi por la venontaj numeroj ankoraŭ pli grandan apetiton!*

*Amike,*

*Bert*



22.04.2021 13:32

Kara Bert!



Walter Bormann

La bildo

montras D-ron **Werner** Bormann! [https://eo.wikipedia.org/wiki/Werner\\_Bormann](https://eo.wikipedia.org/wiki/Werner_Bormann)

Kore,

Frank Merla [frali.net](http://frali.net)

22.04.2021 14:10

*Kara Frank,*

*Dankon pro via rimarko kaj korekto de nia eraro. Krome pro via kunlaboro rilate al nia revuo.*

*Amike kaj numismate*

*Bert*





22.04.2021 15:41

dankon, mi 'manĝis' ĝin tre rapide.

amike

renato



22.04.2021 20:11

Korege, mia kara Bert, mi dankas pro la sendo.

Tuj mi presos ĝin por ĝin frandi surlite antaŭ endormiĝo, kiu ne estos kaŭzita de via belega ENA-revuo, sed de mia laceco!

Amikajn salutojn kaj brakumojn, unu al vi kaj la alia al Vivi!

Via Elda



22.04.2021 21:24

Koran dankon, Bert, mi ĝuos ĝin !

Amike,

Henri



23.04.2021 12:39

Dankon!

Mi transsendis revuon al niaj legantoj

Amike,

Maria (Pollando)



23.04.2021 17:04

Multan dankon, Bert, pro la akurata ĉiudumonata alsendo de la ENA-revuo!

Kvankam mi ne estas vera numismatikulo, mi ĉiam ŝatas trafoliumi la revuon kaj legi la interesajn analizojn, kaj la artikolojn, kiel ĉi-foje pri Franz Jonas, pri kiu mi jam sciis ke li estis esperantista prezidanto de Aŭstrio, sed ne konis la detalojn pri lia esperantistiĝo kaj vivo.

Amike salutas,

Ivo



Karaj Legantoj,

ĉi tiu stranga tempo vere ŝajnas esti daŭripova (usone / metafore: *sustainable* – io kapabla nutri sin mem). Preskaŭ ĉiuj okupiĝas pri tiu temo kaj la skeptikuloj suspektas ke intertempe informitaj gravuloj realigas multe pli grandajn aferojn – survoje al *nova, bonega mondo* (laŭ priskribo de A. L. Huxley). Ni ne miksiĝas en tiuj polemikoj / diskutoj kaj proponas al vi kelkajn artikolojn kun pli pozitiva rigardo. Espereble vi ĝuos tion. Amike – NU red.

Lastaj E-novaĵoj. Estas agrable informi vin, ke la t.n. viruso ne detruis laboron de la esperantistoj. El diversaj leteroj ni eksciis ke:

- Aŭstraliaj esperantistoj kutimas komunikiĝi trans plej longaj distancoj kaj ili organizas ret-kunvenojn. Kiel skribis, s-no Sandor Horvath, en unu el tiaj virtualaj sesion oni diskutis pri strategiaj problemoj de nia movado. La kunordigantoj invitis al tio esperantistojn el Japanio, Koreujo, Rusio kaj el aliaj landoj.
- Internacia Komerca Esperanto-Federacio /**IKEF** organizas regule prelegojn en Esperanto pri temoj ligitaj ĉefe al komerco per Esperanto sed foje ankaŭ pri ekonomio en ĝenerala senco. Brazilano Fabricio Valle prelegis pri "La fundamentoj por pli rapida evoluiĝo de esperantista ekonomio".
- Unu svisa korespondanto serĉas esperantistojn, kiuj povus lin helpi en tradukado de german-lingvaj tekstoj al Esperanto: <[reinisch.ke@chello.at](mailto:reinisch.ke@chello.at)>.
- **Kiel kutime, aktivaj restas membroj de Numismatika E-klubo kaj ni menciis tion kelkfoje.**

esperanto hamilton



03.05.2021 9:19

*Kara Sinjorino!*

*Pardonpeton pro la prokrasto de mia respondo!*

*Mi nun preparas la artikolon pri viaj verkoj kaj la persono de Bernhard.*

*Ĉu vi deziras regule senpage ricevi nian revuon? La venontan mi jam certe sendos al vi.*

*Amike,*

*Bert Boon*

03.05.2021 16:23

Kara Sinjoro!

Dankon pro via interesiĝo pri Bernie kaj pri miaj kupraĵoj.

Pri li vi certe trovis informojn per Vikipedio kaj leksikonoj, ekz. Sutton: Original Literature of Esperanto; Korĵenkov:Nia diligenta kolegaro. ktp.....

Ĉu vi deziras montri al ni vian artikolon? Ĉu vi povos sendi ĝin kaj poste la revuon rete?

Sincerajn salutojn

Éva Golden + miaj filoj

*A N O N C O J*

*&*

*E V E N T O J*

[UK en Belfasto nuligita: anstataŭe okazos duafoje la Virtuala Kongreso](#)

## La 106-a UK

Belfasto — Nord-Irlando

17 — 24 de julio 2021



La 106-a Universala Kongreso en Belfasto, Nord-Irlando

Paco kaj Konfido: universalaj valoroj



## *Varbilo por ENA!*

### **Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

### **Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 148 individuaj membroj kaj 23 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

**Vi krome rajtas unue peti provnumeron!**

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

[bert.boon@skyne.be](mailto:bert.boon@skyne.be)